



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

marto 2021



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA
KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ**
Volumo 28[1] numero 141 marto 2021

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktistoj: Terry Manley, Andrew Woods

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK
GPO Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa). Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de majo 2021

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2021 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.
ISSN 2207-0087

Sur la kovrilo

Whanganui, Nov-Zelando
(David Ryan)

Aliaj bildatribuoj

p4 Pixabay, rebel1965

enhavo

- 04 Antaŭparolo
- 05 La ina kontribuo al homeco
- 06 Pensoj pri la Reta Somerkurso
- 07 Manĝeblaj insektoj en Madagaskaro
- 08 Carlo Minnaja: mia esperantista vivo
- 12 Rakonto pri du sistemoj (II)
- 13 Eŝike prelegi
- 16 Ĉu nova nomo por Nov-Zelando?
- 18 Ni kongresis virtuale unuafoje
- 20 Whanganui: vizitinda urbo en NZ
- 22 Financa Raporto

ANTAŬPAROLO

Ĉu pro manko de realaj renkontiĝoj ni ricevas malpli da artikoloj en la jaro de la pandemio? Ja ofte la artikoloj temas pri renkontiĝoj aŭ ekskursoj. Aŭ ĉu multaj okupiĝas pri la virtualaj renkontiĝoj sur la ekranoj de siaj komputiloj kaj ne dediĉas tempon por verki artikolojn?

Certe ĉijare la internacia interbabilado daŭras malgraŭ la nuligo de preskaŭ ĉiuj E-eventoj. Kongresoj virtualaj okazas en multaj landoj inkluzive ĉi tie en Aŭstralio. Okazis AEA-NEA kuna kongreso/kursaro en januaro 2021. Kaj tiuj estis partopreneblaj en iu ajn lando. Do la interreta mondo estas ja malgranda.

Krom tio AEA organizas prelegserion por ke siaj membroj kaj ankaŭ eksterlandanoj povu ĝui tion.

Do ĉu papera gazeto apartenas al virtuala mondo? Malgraŭ tio ke la gazeto ne estas tiel akurata kiel Aŭstraliaj Esperantistoj iuj membroj ankoraŭ esprimas deziron ricevi realan paperan gazeton.

Donald Rogers kaj Vera Payne fidele provlegas la artikolojn kaj donas ŝatatan konsilon pri tiuj.

Ĉu oni kulpigu la kronviruson pro ĉio? La septembra numero ne aperis pro iuj cirkonstancoj iel rilataj al la viruso. Je tiu tempo la AEA estraro ankoraŭ ne findecidis pri okazigo de reala kongreso en Sidnejo januare 2021. Tial la planita gazeto havis malgustajojn rilate al tiu grava informo. Pro prokrasto kaj pro manko de artikoloj, kiel menciita komence en la raporto, la septembra numero falis de sur la breto kaj fakte iĝis la decembra numero. Pardonpetojn al la membroj pri tio. Kaj multajn pardonojn pro la malfrueco de ĉi tiu numero. Ni baldaŭ esperas solvi tiun problemon. Sed memoru ke vi la membroj kreas la gazeton. Do ek al la laboro kaj sendu artikolojn al: esk@esperanto.org.au

TERRY MANLEY



La ina kontribuo al homeco

Charles Stevenson

Unu el la grandaj ravaĵoj de mia maljunaj jaroj, kiel vidvo, estas mia filino. Ĉiun matenon ŝi mesaĝas al mi telefone por konstati ĉu mi ankoraŭ vivas sen frakasita gambo, kaj ke mi ne glitis sur la mato! Tiam ni diskutas kaj la veteron kaj kion ni intencas fari dum la tago.

Dum la malfacilaĵoj de la kronviro epidemio multaj el la klientoj de mia filino devis nuligi kontrakton ĉar ŝi ne povis vojaĝi en Viktorio. Kune kun sia kunulo ŝi loĝas apud la landlimo inter Sud-Aŭstralio kaj Viktorio. Do mi, kiel patro, devas helpi ŝin, same kiel ŝi helpis min, prenante min en sian hejmon, kiam mi frakasis la brakon.

Kordelia, la ŝekspira karaktero en *Reĝo Lear*, estas mirinda ekzemplo de

senkondiĉa amo inter filino kaj patro. Sed nia situacio ne precize samas al tiu de Kordelia, ĉar mia kara Katarina neniam estis ekzilita, kvankam ŝi ja loĝas en la fora kamparo.

Laŭ mi, aktuale mia filino prezentas la econ de ĉiu virino. Kutime virineco sugestas zorgemon, percepton, komprenon dum aliflanke la viro estas, diversgrade, polemikema.

Certe mi havas gefratojn, genevojn kaj genepojn kaj ni ĉiuj subtenas unu la alian. Sed la rilato malsimilas al tio de virineco.

Aparteni al familio kiu akceptas nin, senkondiĉe, forte kontribuas al nia bonfarto. Feliĉa estas la viro kiu posedas tian interrilatadon.



Pensoj pri la Reta Somerkurso

Marc Schmidt

En kvin tagoj de la 2021 AEA-kongreso, mi instruis la Esperanto-kurson por komencantoj. La kurso okazis interrete. Instrui Esperanton tiel estis bona okazo, do mi volas skribi iomete pri tio por vi.

Ni planis fari la kurson per 'Jitsi', programo kiu estas kiel Skype aŭ Zoom. Tamen, problemo okazis. Kiam la unua leciono komenciĝis, mi ne povis aŭdi la aliajn lernantojn, kaj ili ne povis aŭdi min. Post mallonga tempo, mi kaj la lernantoj konstatis ke Jitsi ne funkcias, do mi telefonis la AEA, kiu proponis ke ni anstataŭigu Zoom-on. Mi jam havis Zoom-konton, do mi ja kreis Zoom-kunsidon kaj disdonis la ligilon al la pacience atendantaj lernantoj. Sukcese! La leciono komenciĝis.

Mia ofico estas instruisto en elementa lernejo, kaj mi jam ekkonis Zoom-on fojfoje en 2020. Kiam la pandemio komencis influi normalan vivon en aprilo, kaj lernantoj komencis resti hejme por lerni tie, mia lernejo ekpretiĝis por interreta lernado per Zoom. Do, tial mi jam havis Zoom-konton, kvankam mi ne estis tre lerta pri Zoom. Ni perdis ĉirkaŭ 30 minutojn pro interretaj problemoj, sed finfine la leciono iris glate.

Mi volis skribi notojn ie, kiel mi farus sur blanka tabulo en normala 'vizaĝo-al-vizaĝa' leciono. Mi elektis PowerPoint-on kaj interŝanĝado de ekranoj (*screen share*). Tamen, kiam oni uzas Zoom-on, onia komputilo funkcias pli malrapide. Pro la malrapideco, kiam mi tajpis en PowerPoint, la literoj aperis malrapide, kaj ofte ne orde. La lernantoj devis esti paciencaj, kaj mi alkutimiĝis al la ritmo de 'Zoom-tajpado'.

Estis ĉirkaŭ 12 lernantoj ĉe 8 lokoj, inkluzive en ĉambro kun 4 homoj. La leciono de Tago 1 finiĝis. Malgraŭ la problemoj pri Jitsi kaj la malrapideco, la lernantoj ŝajnis feliĉaj pri la leciono. Ni parolis kaj legis Esperanton aktive, kaj ni kunsidis. Mi donis malgrandan hejmtaskon al la lernantoj por fari kaj sendi al mi retroŝte. La plejmulto el la lernantoj faris la hejmtaskon. Mi kontrolis ĝin, kaj respondis al la lernantoj. Mi ankaŭ faris simplan retejon por novaĵo, informo,

kaj registrado de notoj pri la leciono, kiujn oni ankoraŭ trovas interrete. La ligilo estas sub ĉi tiu eseo.

Tago 2 komenciĝis, sed refoje okazis problemoj. La ligilo por la Zoom-kunsido ne plu funkciis, ĉar ĝi estis nur unufoja kun-sido. Oni devas fari 'ripetiĝantan' kunsidon; tiam la ligilo funkcias tagon post tago. Tial iom da konfuzo okazis. Mi kreis novan Zoom-kunsidon. Baldaŭ la nova ligilo dis-doniĝis, kaj la leciono komenciĝis. Ni ne perdis tiom da tempo kiom ni perdis je Tago 1. La lernantoj estis pardonemaj kaj paciencaj pri la prokrastoj. La leciono refoje okazis glate, kaj refoje mi donis hejmtaskon.

Por la finaj tri tagoj, mi kreis ripetiĝantan Zoom-kunsidon, kaj certigis ke la lernantoj ricevis la ligilon. Nenia problemoj okazis: la lecionoj komenciĝis akurate, kaj okazis tre glate. La lernantoj alkutimiĝis al la ritmo de lernado kaj komunikado per Zoom. Mi eltrovis ke ĉiu komencanto sciis iom el la fundamento kaj vortotrezoro de Esperanto, sed ne havis bonan okazon konversacii Esperante. Mi provis doni parolado-ekzercon al la lernantoj laŭvice.

Malgraŭ la problemoj je la unuaj du tagoj, mi opinias ke la kurso bone sukcesis. La lernantoj lernis kaj partoprenis ridete kaj sincere. Ofte ili petis aŭ postulis klarigon, aŭ pli da informo. La plejmulto el la lernantoj faris la hejmtaskon.

Ĉe la komenco, mi intencis paroli kaj skribi nur Esperante. Tamen mi baldaŭ eltrovis ke ĉiu lernanto sciis iom de la angla lingvo, do mi uzis ĝin fojfoje, por helpi klarigi. Fojfoje ankaŭ lernanto komunikis per la angla al mi.

Mi ekkonis la lernantojn dum la 5 tagoj. Tial, mi estis iomete malĝoja kiam la tempo alvenis kiam ni devos adiaŭi unu la alian. La lernantoj estis el Indonezio, Sudkoreio, Japanio, Brazilo, kaj Aŭstralio. Espereble mi renkontos ilin iam en Esperantujo. "Ho jes, mi memoras vin de la AEA reta Esperanto-kurso de januaro 2021!"

<https://sites.google.com/view/esperantosomerkurso2021/tago-1>

Bredado de Manĝeblaj Insektoj en Madagaskaro

Donald Rogers

Pro la abundo da insektoj kaj la manko de sufiĉaj nutraĵoj en la mondo, la Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo de la Unuiĝintaj Nacioj konsideras, ke la mondo devus pripensi la ideon, pli ĝenerale manĝi insektojn. Insektoj enhavas altan elcenton da proteinoj, mineraloj kaj grasoj; kaj unu triono de la homaro jam manĝas insektojn.

Madagaskaro estas granda insulo. Ĝia izoleco kaj tropika klimato ebligis la evoluadon de granda gamo da plantoj, bestoj kaj aliaj organismoj. La plejmulto el ĝiaj bestaj kaj plantaj specioj ne ekzistas ekster Madagaskaro. Madagaskaro havas enorman biodiversecon, sed tio rapide malaperas. Malriĉeco kaj la manko de manĝaĵoj pelas la indiĝenajn Malagasojn prirabi la arbarojn por trovi ion manĝeblan. La kutimaj minacoj — klimata ŝanĝiĝo, invademaj specioj, troa rikoltado, kaj perdado de vivmedio — jam kaŭzis gravajn perdojn. La endemiaj lemuroj nun estas la plej endanĝerigita grupo de primatoj sur Tero.

Madagaskaro estas unu el la 15% plej malriĉaj landoj, ĝiaj fontoj de manĝaĵoj ne estas sekuraj, pli ol 90% de la Malagasoj (la praloĝantoj) estas malriĉaj, kaj pli ol duono de la junaj infanoj suferas pro malsufiĉa nutriĝo.

D-ro Brian Fisher, entomologo, kiu vizitadis Madagaskaron multfoje tra 25 jaroj por studi formikojn, rimarkis, ke la arbaroj estas iom post iom detruataj; ke specioj, kiujn li antaŭe studis kaj nomis, ne plu ekzistas, pro fajroj ktp. Same okazas pri mamuloj kaj aliaj bestoj kaj plantoj. Fisher lanĉis aŭdacan planon por malhelpi tiun detruadon. La insektmanĝado jam estas tradicio ĉe iuj Malagasoj. Do Fisher decidis helpi ilin bredi insektojn kaj plivastigi tiun manĝkutimon — ĉar insektoj ja povas esti valora fonto de nutraĵoj kaj eĉ enspezoj.

Fisher kunigis grupon de entomologoj kaj membroj de konservaj kaj homamaj organizoj, por kuraĝigi la Malagasojn pli sisteme ekspluati insektojn kaj konservi la biodiversecon. Li aranĝis helpon de la kompanio *Entomo Farms*, bazita en

Kanado, kiu estas la plej granda bredanto de manĝeblaj insektoj en la mondo. Ĝi produktas grilan pulvoron por proteinaj tablojdoj, trinkoj, fritoj, krakpanoj, pastaĵoj, kaj aliaj manĝeblaĵoj. Pro la instigo de Fisher, *Entomo Farms* nun konstruas fabrikojn en Antananarivo, la ĉefurbo de Madagaskaro, por produkti manĝaĵojn el insektoj. La stabanoj estas lokaj Malagasoj.

Griloj estas tre taŭgaj por bredado. Ili kreskas rapide, kaj estas uzeblaj post nur ses semajnoj. Ili konsumas nur akvon kaj grenon. Ili ne malŝparas energion por varmigi sian korpon. Kiel manĝaĵo por homoj, ili liveras ne nur proteinojn, sed ankaŭ fibrojn kiuj estas sanigaj. Kiel kromprodukto, oni gajnas ekskrementon, kio estas utila sterko.

Fisher diris, ke oni ne maltrankviliĝas, manĝante produktojn el grilpulvoro. Oni manĝas ilin ĉar ili estas bongustaj.

Alia specio de insekto, kiun manĝas la Malagasoj en iuj vilaĝoj, estas specio de fulgorido (*Zanna madagascariensis*, aŭ *sakondry* en la malagasa lingvo). Ĝi nutras sin per la suko de sovaĝaj fazeoloj. Oni fritas tiuspeciajn insektojn sen aldoni grason, ĉar ili jam enhavas sufiĉan grason. Ili gustas je peklima porkviando ("bakono"). Sciencistoj esploras metodojn bredi ilin.

Fisher vizitas diversajn vilaĝojn por trovi tiujn, en kiuj oni volantas bredi insektojn. Li klarigas al la vilaĝanoj pri la projekto, kaj rekrutas tiujn vilaĝojn kiuj volantas partopreni. Li jam distribuis semojn de fazeoloj al foraj vilaĝoj kiuj aliĝis al la projekto.

La gajno estas duobla, ĉar la insektoj trinkas la sukon el la fazeoloj sen signife malhelpi la plantojn. Do la homoj manĝas kaj la fazeolojn kaj la insektojn. La rezultoj de la novaj praktikoj estas, ke la homoj, precipe la infanoj, estas pli bone nutritaj, kaj oni malpli detruas la arbarajn bestojn.

Por plua informo kaj multaj fotoj, legu la artikolon de Andy Isaacson.

Se vi volas manĝi produktojn faritajn el insektoj, iru al <https://eatcrawlers.co.nz/> aŭ <https://ediblebugshop.com.au/>. Bonan apetiton!

Mia Esperantista Vivo

Carlo Minnaja

Carlo Minnaja (Roma, 1940), doktoro pri matematikaj sciencoj kaj poste ankaŭ pri historio, nun emerita esploristo ĉe la universitato de Padovo, estis profesoro pri matematikaj fakoj ĉe la sama universitato, ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, ĉe la ŝtata universitato "Lucian Blaga" en Sibiu (RO) kaj vizitprofesoro ĉe la Politekniko de ŝtato Virginia (Usono). En esperanton li aperigis ĉirkaŭ 200 tradukojn el diversaj lingvoj kaj dialektoj. Aŭtoro de la plej granda itala-esperanta vortaro (Co-EdEs, 1996). Iama ĝenerala sekretario kaj vicprezidanto de TEJO, prezidanto de la Itala Esperantista Junularo, direktoro de la Itala Esperanto-Instituto estas ekde 1973 membro de la Akademio de Esperanto kaj estro de ĝia komisiono pri historio; membro ankaŭ de la Akademio Literatura de Esperanto. En 1990 li estis distingita per la premio por Kulturo de la itala Ĉefministro. Prelegis en Septembro 2020 en nia prelegserio. 80 jaraĝa.

Mia familia gastlibro estis inaŭgurita la 10an de junio 1939 kun la dediĉo: *Al la juna espero de esperanto kiu pli feliĉa ol la subskribintoj sendube ĉeestos ĝian triumfon.* Ĝi estis dediĉita al mi sed ja al mia frato, naskiĝinta la 9an de januaro 1938. Ĝi havis la subskribon de la tiama prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, generalo markizo Carlo Cordero di Montezemolo, de akademiano Stefano La Colla kaj de kelkaj romaj esperantistoj. Do evidente tiam la ideo de la fina venko estis rigardata kiel certa, eĉ se ne tute baldaŭa.

Mi naskiĝis la 19an de marto 1940. En la sama paĝo: *La unua roma esperantisto al la plej juna roma esperantisto*, kun dato 20an de julio 1940, evidente estis dediĉita al mi (subskribo de sacerdoto Luigi Giambene).

En 1944 Italio estis en la pleno de la mil-

ito, kvankam estis jam armistico inter Italio kaj la alianco gvidata de Britio-Usono, sed Germanio ne armisticis kaj reziste okupis grandan parton de Italio; mi memoras longajn vicojn da germanaj tankoj retiriĝantaj norden kaj alvenon de trupoj de la kontraŭa flanko (usonanoj, britoj, novzelandanoj, marokanoj, poloj). Ni ne kapablis distingi amikojn de malamikoj, kaj ni estis ege teruritaj kiam iun vesperon oni sonoris ĉe la pordo; prezentiĝis armeano kun uniformo kaj armilo. Li diris "Bonan vesperon". La tuta angoro forvaporiĝis: se iu parolas esperanton li certe ne povas esti malamiko, kaj tiun senton mi ĉiam tenis dum mia tuta vivo. La armeano estis Douglas Murphy, evidente li vidis ĉe nia pordo la ŝildon de Internacia Esperanto-Ligo; li estis fondinto de la societo de skoltaj esperantistaj, li adaptis al populara melodio la vortojn "Esperanto estas la lingvo por ni".

Dum kelka tempo la okupaciantaj trupoj restis en Romo kaj ni estis ofte vizitataj de juna novzelanda infanteriano, Adriano Potts, same kiel ni denaska esperantisto, do li estis la unua denaskulo kun kiu mi parolis, krom mia frato. Vizitis nin ankaŭ anglo Robert Robertson, kiu fondis societon (anaron) de denaskaj esperantistoj, kun koncerna membrokartoj; nuntempe estas miloj (ekzistas ankaŭ retlistoj), sed tiam ni estis nur kelkdeko. Lastatempe ĉirkaŭ denaskismo leviĝis artifika polemiko, kvaŭ ĝi estus socia problemo, ĉu ĝi estas avantaĝo aŭ malavantaĝo; mi naskiĝis en tiu medio kaj mi ĉiam konsideris tion avantaĝo.

Mi estis aligita de mia patro al ĉiuj movadaj institucioj, do mi jam infano membriĝis ĉe UEA kaj Itala E-Federacio. Aparte interesa estis tiam Universala Ligo, ne ja kun esperanto kiel celo, sed kiel rimedo. Ĝi havis landajn asociojn, sed

estis kuniĝo de unuopuloj kiuj volis kunigi la mondon per universala lingvo kaj universala mono. Ĝi lanĉis la "stelon" kun valoro de ¼ de guldeno, poste ofte uzatan kiel pagilon en la esperanto-mondo, sed fariĝintan nestabila pro la oscilado de la kurzoj; ĝia uzateco daŭris iele-tiele ĝis la Sepdekaj jaroj, ĝis oficiala likvido en la jaroj Naŭdekaj; nun la koncernaj moneroj, de tempo al tempo revivigataj, estas objektoj por kolektantoj.

Mi rakontu ĉarman epizodon dum la esperanto-dissendoj de Radio Roma, okazintaj en la periodo 1935–1942 kaj poste reprenitaj en 1950 (ili daŭros ĝis 2007). La estro estis la "esperanta voĉo" Ascenzio Blasimme, mia patro (Luigi Minnaja, 1899–1974) estis ĉefkunlaboranto kaj en 1952 mia tuta familio estis engaĝita en kvazaŭ sursceneja legado de "Pinokjo", infanromaneto kie protagonistas ligna marioneto, en esperantigo de Mirza Marchesi: mi rolis kiel Pinokjo, mia patrino (Carolina Minio-Paluello Minnaja, 1903–1984) estis la "feino kun lazura hararo", mia frato rolis kiel rakontisto, mia patro kaj Blasimme rolis en okazaj viraj voĉoj. Laŭ la korespondadoj alvenintaj al la radiostacio, la dissendo plaĉis; originala estis karto adresita al "Pinokjo, Radio Roma, Esperanto-fako, Italio".

Jen kurioza anekdoto pri strata akcidento en 1957, kiam kun mia familio mi partoprenis la kulturajn feriojn en Kastelo de Grésillon, dum kiuj prelegis pluraj eminentuloj: mi biciklis kaj falis teren pro kunpuŝiĝo kun sinjorino kiu envenis de la trotuaro en la straton. Ĉe rehejmiĝo en la Kastelo mia (leĝera) survizaĝa skrapvundo estis bandaĝita de d-ro Albault, kiu poste iĝis prezidanto de la Akademio de Esperanto; ĉe la polica enketo pri la akcidento kaj ĉe la sekva postulo (rifuzita) pri damaĝoj starigita de la asekuro de la sinjorino mi estis jure asistita de prof. Lapenna, jam fama UEA-estrarano kaj poste prezidanto. La tuj postan semajnon miaj gepatroj iris al Romo por la esperanto-dissendoj, dum mi iris al la TEJO-kongreso en Villeneuve-les-Avignon, konfidita kun grandaj rekomendoj pri prudento al saĝa adolto, kiu rolu kiel mia vicpatro kaj

min detenu de nesingardaj bubajoj: tiu saĝulo estis Wiliam Auld. Do en tiu feriado mi, ventkapa dekseparulo, havis la okazon strikte kontakti kun tri elstaruloj, kun kiuj, cetere, mi forte intimiĝis poste.

Ĉieste en la tempo de mia junula aĝo Tutmonda Junulara Organizo (TJO), origininta el la SAT-medio, transformiĝis al TEJO, enprenante en la titolon la nomon de la lingvo kaj fariĝante, baldaŭ poste, la junulara sekcio de UEA. Kiel laŭdestine okazas al ofta partoprenanto en kongresoj, mi trapasis ĉiujn etapojn en la esperantokariero: vicprezidanto kaj poste sekretario de TEJO (1961–1967), prezidanto de Itala Esperantista Junularo, komitatano de UEA, estrarano de la Itala E-Federacio, direktoro de la Itala E-Instituto (1967–1977); ekster la esperanto-medio mi abiturientiĝis en la klasika liceo kun kono de la angla, doktoriĝis pri matematiko en la universitato de Pisa, kie mi lernis la germanan kaj vizitis kurson pri la rusa.

Dum miaj universitataj jaroj ĉe elita studenta kolegio Scuola Normale Superiore en Pisa, mi baldaŭ havis koramikino kiu poste fariĝos edzino (Luisella Sergiampietri, 1939–1982). Beletristino tre sentema, ŝi trenis min al literaturo, stimulante en mi la percepton de la profunda signifo kaj beleco de la unuopaj vortoj; ŝi estis pasia admirantino de la itala verkisto Cesare Pavese, kaj mia italigo de ties poemoj (eld. LF-koop, 1982) estis la lasta libro kiun ŝi legis kaj kiu ankoraŭ estis sur la noktotableto de la hospitala lito ĉe ŝia forpaso.

Kiel matematikisto mi estis kaj restis iom aparta, ĉar mi flegis ne ja la klasikan matematikon sed matematikon aplikatan al lingvaj sciencoj; krom du etaj komencarkariere, mi konstruis ja ne teoremojn sed modelojn pri fonetiko, pri aŭtomata klasado de adjektivoj, nomoj; mi estis rigardata kiel strangulo laŭ matematikistoj kaj kiel eksterhejma invadanto laŭ literaturistoj. Fine mi fariĝis universitata stabila profesoro pri analitiko kaj simetrie mi estis akceptita ankaŭ inter la lingvistoj.

Mia generacio estis forte influata de prof-ro Ivo Lapenna, de lia oratora arto, de liaj artikoloj, de lia triumfo en Montevideo;

li emfazis la sloganon “unueco estas forto” kaj alvenigis TEJO-n en UEA; ĉi lasta deziris monopoligi la movadon entute kaj ĉio kio riskis endanĝerigi tiun monopolon estis rigardata kiel bakterio. Mi havis la ideon, ke ĉiu fosu sian sulkon kaj rajtu senti sian es-perantistecon laŭ sia spirito; mi do favoris la sloganon, ke “diverseco estas riĉo”. Mi restis ĉiam amiko de Lapenna ankaŭ kiam li disiĝis de UEA kaj mi eĉ fariĝis prezidanto de la Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna (nun estingiĝinta); cetero en la postaj jardekoj UEA kverelis kun ĉiuj, kun Heroldo, kun Esperanto-Radikala Asocio, kun Esperanta Civito.

La 1970aj estis bela periodo ĉirkaŭ la literatura rondo “La Patrolo” kaj la revuo *Literatura Foiro*. La Patrolo kunigis ĝis sep personojn, kun junaj kaj nejunaj: mi amikiĝis kun Clelia Conterno, redaktoro de la itala revuo, tre amema persono, edzino de itala oficiro internigita en germana kampo kie li malsaniĝis pro fastado, kiu poste kondukos lin al morto. Tiu periodo estis tute serena; inter 1966 kaj 1971 naskiĝis tri gefiloj, edukitaj denaske ankaŭ en esperanto; kvankam poste ili ne plu ĝin praktikis. Mia edzino instruis italan, latinan kaj esperanton en sia liceo.

La posta jardeko komenciĝis tragike: morto de mia edzino, morto de nia unue-naskita filino, kiu estis longtempe malsana kaj kiu ne saviĝis malgraŭ du hepato - greftoj realigitaj en Usono. Mi klopodis reagi al ĉi tiuj katastrofoj: mi edziĝis al unu mia eksa studentino kaj kun ŝi havis filinon, tiel ke mi refoje starigis kvinperso-nan harmonian familion; ĉiuj kore sin amis kaj ĝuste antaŭ kelkaj tagoj, kiam ŝi edziniĝis, venis la fratoj el Londono por festi malgraŭ la pandemio.

Post tiuj tragikaj jaroj, mi kunlaboris ĉiam kun la nuna edzino, kiu estis fariĝinta profesoro pri informadiko; mi agadis pli kaj pli ĉirkaŭ esperanto. Okaze de la publikigo de la antologio de italaj poetoj de la 20a jarcento “Enlumas min senlimo” (LF-koop, 1990) mi havis la okazon intervui plurajn italajn poetojn, kiuj montris simpatian al esperanto. Ĉu pro tio aŭ nur okaze de tio, mi ricevis la Premion de la Kulturo de la itala ĉefministro: mi estas tre fiera pri ĝi,

laŭ mia scio neniu itala esperantisto akiris ion tian. Sekvos pluraj aliaj antologioj el la itala regiona literaturo, eĉ el lingvaj minoritatoj.

Kelkajn revojn mi havis en la vivo: unu el tiuj estis itala-esperanta vortaro, konfidita al mi post la morto de la iniciatinto Stefano La Colla en 1966. Mi longe prokrastis dum la tragika periodo de mia vivo, poste estis intertempe mortintaj miaj du helpantinoj, mia patrino kaj Clelia Conterno; sed, la 2an de januaro 1992 mi longe meditis kaj mi decidis, ke ne eblas, ne honestas forlasi tiom grandan jam komencitan laboron, ke mi devas kompletigi ĝin. Kun la helpo de mia edzino, de mia bopatrino, de mia frato, kiuj reviziis la tuton, mi fine akuŝis la 1438-paĝan volumon en 1996; ankoraŭ nun ĝi estas inter la plej riĉaj vortaroj de etnolingvo al esperanto.

Fine de la 1980aj mi estis allogita al AIS San Marino (kiu nun nomiĝas nur AIS ĉar San Marino ne plu patronas) de prof-ro Helmar Frank, profesoro pri kibernetiko kaj kibernetika pedagogio. Li havis iluzion, ke la facileco de esperanto ebligas al studento, post dutaga lingva kurso, sekvi plenan sciancan esperantlingvan kurson en la tuj posta semajno. Celo iom optimisma, sed sekve de tiu iniciato AIS fariĝis ordinara ero en la UKoj, tamen la revoj de Frank, ke internacia lingvo fariĝu tutmonda en la scienco fakte ne realiĝis.

Intertempe mi refariĝis universitata studento en Venecio kaj magistriĝis pri historio; mia edzino instigis min, ke mi proponu al referanto priesperantan temon; mi do proponis tion kaj ĝi ja estis akceptita, tial mia disertacio “Cent jaroj da tradukoj de la itala al E-o” estis aprobata *summa cum laude*, kaj rezultis, eldonita de la universitato, mia historia verko *L’esperanto in Italia*. Post tiu magistriĝo, en mia universitato de Padovo mi iĝis, krom profesoro pri analitiko, ankaŭ profesoro pri historio de matematiko ĝis mia emeritiĝo en 2010.

Plue, mi ankaŭ estis allogita de tradukado por la serio “Oriento-okcidento” lanĉita de UEA, kaj en 2006 aperis traduko, abunde prinotita, de *La Princo* de Machiavelli (It. E-Federacio)

En 2015 aperis, kun kunaŭtoreco de Gior-

gio Silfer, la *Historio de la Esperanta Literaturo (HEL)*, abiturienta teksto, laŭ modelo de samtipaj tekstoj en la itala, germana, franca kaj hispana. Kritiko kaj publiko larĝe favoris tiun verkon.

En 2018 aperis *Historio de la Akademio* kun diversaj fotoj sur la kovrilpaĝo. Mi estas aparte fiera pri tiu de Walter Lippmann, rekordulo de la ĉeesto en la Akademio (63 jaroj), katolika germano migrinta al Usono en 1941 pro la hitlera persekuto kaj reveninta al Germanio nur en 1955.

Mia lasta traduko estis el Claudio Magris *La muzeo de la milito*, reviziita de Federico Gobbo (Flandra E-Ligo 2019).

En 2017 mi estis nomumita Honora membro de IEF.

En 2019 mi akiris la KCE-diplomon de nivelo C2 laŭ la Lingvotesta Sistemo de la Esperanta Civito.

Mi povas ankaŭ fieri pri diplomo pri fideleco al UEA, daŭranta fakte de pli ol 70 jaroj.

Rakonto pri du sistemoj (Parto Dua)

Igor Mosin

tradukite de Marumi Smith

Dum la kreskanta anarĥio, la militistoj perdis sian potencon. La salajroj de generaloj reduktiĝis al monsumeto, kaj fabrikoj de armiloj kaj municioj estis fermitaj. (Nur ekde kiam Putin alvenis al la sceno la ordo revigliĝis). Iĝis pli kaj pli klare ke partiaj reformoj ne funkciis kaj ia revolucio estus bezonata por solvi la problemon kiel provizi sufiĉan manĝaĵon por nutri ĉiujn homojn.

La ekonomia ministro Valentin Sergeevich Pavlov enkondukis valutan reformon en Januaro 1991, anoncante, ke 50 kaj 100 rublaj monbiletoj ŝanĝiĝos ene de tri tagoj al novaj biletoj, sed nur ĝis 1000 rubloj tage. Do kiuj havis pli ol 3000 rublojn, tiuj perdis la ceteron.

La unuan de Aprilo 1991, la prezoj deklubiĝis en unu tago! Kio kutime kostis unu rublon nun kostis dek, eĉ dum salajroj restis senŝanĝaj. Ni bezonis porciokuponojn por aĉeti sukerojn, lakton, milion, sapon, kaj vodkon, dum alumetoj, pastoj, terpomoj, salo kaj betula vino restis haveblaj.

Viando kaj freŝaj fruktoj kaj legomoj estis malabundaj kaj malfacile troveblaj por ni. Vicoj por aĉeti panon iĝis nin stari dum horoj kaj horoj. Ni manĝis ĉion, kion ni povis trovi, ne kion ni volis manĝi. Malsato ekis. Maljunuloj, kies pensioj ne estis sufiĉaj por vivi, manĝis el la rubujoj. Iu kiu havis somerdomon en la kamparo (ofte nenio alia ol iuj lignaj kestoj krude najligitaj kune) kaj ses akreojn da tero (24 300 kvadratajn metrojn) povus planti siajn terpomojn kaj kelkajn legomojn, sed neniu rajtis posedi plian teron.

Registaraj manĝaĵbutikoj estis malplenaj. La manĝaĵoj troveblaj estis multekostaj, kaj iom post iom privataj manĝaĵbutikoj komencis malfermi kaj vendis eksvalidigitajn produktojn. Ni devis flari aĵon por scii ĉu ĝi estas sendanĝera por manĝi. (Eĉ hodiaŭ rusoj flaras pakitajn manĝaĵojn antaŭ aĉeto). Nutra venenigo estis ofta. Ni devis singardi pri kebaboj venditaj sur la stratoj.

Ili povus enhavi hundan aŭ katan viandon. Ek de 1992 la nutraĵa merkato kaj la mafio prosperis ĉefe en la bazaroj. Vendistoj, precipe sudaj enmigrintoj de Azerbajĝano, Kartvelio kaj Armenio, vendis ĉion, kion ili elektis. Nek estis kasregistriroj, nek kvitancoj. La aŭtoritatoj faris nenion.

Je la fino de 1992, la kvanto da inflacio kreskis ĝis 2509%. Aĉeto de fremda valuto estis malpermesata, sed de 1991 ni aĉetis usonajn dolarojn, germanajn markojn, kaj malpli altajn, britajn pundojn. La nigra merkato funkciis en privataj apartamentoj. Ni sekrete frapis ĉe la pordo de monŝanĝisto kaj identigis nin menciante la nomon de fida homo. Je la sekventa valuta reformo en Julio 1993 (kiam ĉiuj foriris al someraj ferioj), tute malnovaj sovietaj rublaj biletoj kun vizaĝo de Lenin retiriĝis el cirkulado, kaj nur novaj rusaj biletoj estis uzataj. Sed ne pli ol 100 000 rubloj estis konverteblaj, do iuj ajn kiuj posedis pli ol tiu monsumo perdis ĝin. Sed ni ne plu konservis rublojn! Ni jam lernis tiun lecionon!

Por aldoni al la ĝenerala ĥoso, post takso de la nacia teritorio kaj dividado de la tuto inter la popolo, ni ĉiuj ricevis kuponon valorantan je 10 000 rubloj. En iuj kazoj laboristoj kunigis siajn kuponojn kaj privatigis la fabrikon, kie ili laboris. Poste ili konvertis sian investon en akciojn, sed plejofte laboristoj ne havis la scion (oni ne fariĝus kapitalisto dum unu nokto post tiom da jaroj de socialismo) kaj la situacio malfermiĝis por trompisto, kiuj defraŭdis la kapitalojn de laboristoj. Dum inflacio furiozis kaj malsato atakis, homoj komencis vendi siajn kuponojn kontraŭ eĉ nur 500 rubloj. Kiuj havis komercan scion tiuj uzis ĉi tiujn malmultekostajn kuponojn por privatigi fabrikojn kaj akciojn. Tiuj estis la tagoj, kiam sufiĉis vendi malnovan aŭton por aĉeti fabrikon. La simplaj homoj estis prirabitaj de siaj havaĵoj. La ŝtelistoj fariĝis la oligarkia elito de nia nuna socio.

(daŭrigota)

Efike prelegi

Jonathan Cooper

Bazita sur prelego dum la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso de Esperanto, januaro 2021

Ĉu vi iam devis fari prezentadon – eble dum kunveno, seminario aŭ konferenco? “Ĉiuj uzas PowerPoint,” vi eble pensis. Do, vi preparis viajn notojn kaj tajpis ilin en lumbildojn, kiujn PowerPoint aŭtomate konvertis al bulaj listoj. “Mi nun devus trovi kelkajn bildojn,” vi pensis, “por ke la prezentado estu pli bela kaj interesa.” Do, vi faris bildserĉon per Google, konservis la fotojn kaj agluis ilin sur kelkajn lumbildojn. Vi eble ankaŭ aldonis kelkajn bildetojn. La tasko finiĝis. Poste venis la tempo por prezenti. Tamen vi rimarkis, ke la spektantaro ŝajnis al vi iom baraktetema, kaj ne montris tiom da intereso, kiom vi atendis. Aŭ, vi eble tiom pensegis pri la prelega tasko, ke vi ne rimarkis ilian neintereson.

Kio okazis, kaj kial? Kio misfunkciis?

Kvankam meti ĉiujn vortojn sur la lumbildojn forigas la bezonon parke-rigi la paroladon, tio igos ĝin densa, multvorta kaj enuiga. Vi perdos la atenton de la aŭdantaro antaŭ ol vi atingos la malsupron de la unua lumbildo. Fakte, jam ekzistas esprimo pri tiu fenomeno: “Morto per PowerPoint”.

Kiam mi komencis labori ĉe la Art-Galerio de Nova Sud-Kimrio kiel muzea klerigisto en 1982, PowerPoint ne ekzistis. Lumbildoj estis fizikaj objektoj, montritaj per lumbilda projekciilo. Do, dum prelego, miaj vortoj venis nur el mia buŝo, ne aperis sur la ekrano. Kompreneble, se mi volis montri diagramon, kiu eble havas vor-

tojn aŭ nombrojn, mi devis iel krei tion, fotografi ĝin kaj farigi el ĝi lumbildon. Multe da laboro. Nun, la malo estas vera: estas pli facile en PowerPoint meti tekston ol bildon sur lumbildon. Tamen la fakto, ke io estas facile farebla, ne signifas, ke ĝi estas farinda. **Lumbildoj estas ĉefe por bildoj, ne por notoj.** Eĉ eblas, ke vi ne bezonas lumbildojn.

Kiaj estas viaj aŭdantoj?

Tamen, antaŭ ol vi kreos vian unuan lumbildon – aŭ decidis, ke vi fakte ne bezonas tiujn – vi devus demandi vin, “Kion mi volas montri, aŭ pruvi?” Tio estos via celo. Ne sufiĉas diri al vi mem, “Mi parolos pri pluraj interesaj aferoj.” Kompreneble, via temo jam fascinas vin, sed ĉu vian aŭdantaron? Penu imagi, ke vi estas unu el ili. **Vi devus pensi pri la interesoj de viaj aŭdantoj.** Faru demandojn, ne nur respondu al la iliaj.

Mi donu al vi ekzemplon el mia fako de arto. Imagu, ke juna nespertulo pri arto rigardas artaĵon (ekzemple, la pentraĵon *Bailed Up* de Tom Roberts), kun iu, kiu volas klerigi la nespertulon. Tiun homon ni nomu “la klerigonto”. Artajo ofertas multe, ĉu ne? Kio? Imagu, ke la klerigonto parolas: pri estetiko (“Vidu kiel Tom Roberts aranĝis siajn figurojn laŭ sceno trans la bildebena”); pri art-historio (“Tom Roberts estis unu el la fondintoj de la pentrarta Skolo Heidelberg”); pri socia historio; pri la teknikoj de pentrado; pri la biografio de la artisto. Ĉiu oferota afero estas kvazaŭ “hoko”, penante kapti la interesojn de la nespertulo.

Tamen, kio okazas en la menso de la

juna nespertulo? Kiaj "bukloj" eble kaptiĝos per tiuj "hokoj"? Eble pensoj pri la vetero: li forgesis sian ombrelon por la muzea ekskurso, kaj aspektas iom pluve ekstere. Eble pri manĝaĵoj: estas preskaŭ la tempo por lunĉo. Eble pri muziko; pri sporto; pri komputil-ludoj; pri televido.

Nu, ne okazas multe inter la homo kaj la artaĵo, ĉu ne? Do, kio estas la solvo? Kiel la klerigonto povus instigi intereson? Estus vane peni kreskigi novajn buklojn, por la hokoj kapti. Anstataŭe, oni devas respondi al la pensoj kaj interesoj de la *nespertulo*. Ekzemple: Pri la vetero: "Kio estus la prognozo por ĉi tiu tago en la pentraĵo?" Pri manĝaĵoj: "Kiel gustus la pentraĵo, se vi povus manĝi ĝin?" Pri muziko: "Kia muzikaĵo – aŭ *kia* muziko – plej taŭgas kun la pentraĵo?" Pri televido: "Kia televid-programo estus ĉi tio? Ĉu vi pensas, ke vi spektus ĝin?"

Vi eble opinias, ke tiu tekniko estas malrespekta al la arto, ke ĝi estas tro bagatela. Tamen, ni ne supozu, ke homoj scios, aŭ eĉ zorgos pri historia kunteksto aŭ iu ajn el la aliaj "hokoj", ne ĉar tiuj aferoj estas negravaj, sed ĉar, se rilato ne estas farita je la komenco, homoj neniam atingos tiujn "aliajn aferojn". Memoru, ke ne ĉiuj tiom interesiĝas pri la temo de via prelego, kiom vi, eĉ se tiuj decidis ĉeesti vian prelegon! Ili verŝajne estas tro ĝentilaj.

Strukturi

Post kiam vi decidas pri la celo, post kiam vi pensas pri kiel interesi kaj partoprenigi la aŭdantojn, **vi devos krei strukturon por la prelego**. Homoj plej bone memoras aferojn se tiuj prezentiĝas en malgrandaj aroj, prefereble kun ne pli ol tri punktoj. Pastroj komprenis tiun principon dum jarcentoj: estas "la triparta prediko". Se vi havas

pli ol tri punktojn, vi povus kunigi kelkajn duope aŭ triope.

La komenco

Kiom ofte vi ĉeestis prelegon kie la preleganto diras, "En tiu prelego mi diskutos ĉi tion kaj tion, kaj poste mi diskutos tion kaj tiun alian aferon"? Eble li aŭ ŝi donas al vi plenan resumon de la prelego, per lumbildo, kiu montras la skemon. Jes, estas bone eksplicite la *celon* de la prelego, eĉ tre maldetalan skemon, sed "**ne ŝtelu vian propran tondron**". Surprizo estas bona ilo por la preleganto. **Vi devus tuj kapti la atenton de la aŭdantaro**. Unu metodo estas ŝerco; alia estas ia disputinda deklaro; alia estas interesa rekvizito (en la angla, "prop").

Dum la prelego

Dum vi parolas, **uzu specifajn ekzemplojn**, ne ĝeneralaĵojn, almenaŭ ne komence. **Parolu kiel vi parolas**, ne kiel vi skribas. Fakte, la tuta prelego devus esti pli kiel rakonto ol kiel eseo.

Ofta demando estas: ĉu mi parolu rapide aŭ malrapide? Nu, se... vi... parolas... tro... malrapide... vi... perdos... la... naturan... ritmon, kaj viaj aŭskultantoj perdos la signifon. Do, **ne parolu tro rapide aŭ tro malrapide**, sed **uzu paŭzojn saĝe** inter iuj frazoj, por ke homoj havu tempon por digesti ĉiun novan ideon.

Homoj ofte supozas, ke, ĉar mi laboris kiel instruisto kaj muzea klerigisto dum pli ol 30 jaroj, mi ne plu timas pri oratorado. Sed ili malpravas. Fakte, mi ĉiam timas antaŭ ĉiu prelego. La bona novaĵo estas: **timo estas via amiko** (nu, iom da timo!).

Kiam mi laboris ĉe la Art-Galerio, mi ofte devis prelegi pri la sama ekspozicio al diversaj grupoj, eble tri- aŭ kvarfoje ĉiusemajne. Oni eble pensus, ke, post kiam mi ellaboris mian prelegon,

mi simple devis ripeti ĝin multfoje. Tiel mi komence ankaŭ pensis, sed mi baldaŭ konstatis, ke post kelkaj ripetoj, la komunikado iĝis pli kaj pli malbona. Mi ek-eraretis kaj malfreŝiĝis, ĉar mi perdis la energion, kiun iom da timo donas. Do, post ĉiuj ses ĝis ok fojoj, mi tute re prilaboris la prelegon.

pri via aŭdantoj, kaj ili dankos vin pro tio.

Pri lumbildoj

Evitu tro detalajn fonojn. Faru la tekston sufiĉe granda kaj certigi, ke estas sufiĉe da kontrasto inter teksto kaj fono. Ne miksu tro multajn tiparojn. Tamen, estus en ordo havi unu tiparon por titoloj kaj alian por teksta korpo.

Se vi uzos ian animacion (la aperigadon, malaperigadon aŭ movadon de aĵoj en lumbildo, kaj la transirojn *inter* lumbildoj), certigu, ke ĝi estas signifoplena kaj havas kialon, ke ĝi ne estas pli komplika ol necese. Kutime, svagiĝoj sufiĉas kaj kutime estas la plej bonaj.

Plej multe da miaj konsiloj pri tiparoj, fonoj kaj animacio baziĝas sur la diraĵo, "Malpli estas pli." Ĉar **ne ĉio farebla estas farinda**.

Fakte, la plej simpla lumbildo estas tute nigra. En ĉeesta prelego (en reala ĉambro), tio estas la plej bona solvo se vi volas, ke homoj rigardu *vin*. Tamen, per la reto, povus esti pli bone ĉesi la dividadon de via ekrano, kaj poste (se necese) re-dividi ĝin.

Resumo: tri gravaj punktoj por memori

- Ne ĉio farebla estas farinda. Evitu ion ajn se la sola kialo estas "Tio aspektus mojosa!"
- Amu kaj vian temon kaj vian aŭdantaron. Estu entuziasma pri tio, kion vi parolas, sed imagu, ke vi estas unu el la aŭdantoj, kiu eble ne estas tiom entuziasma kiel vi... ankoraŭ.
- Ne timu timon. Se vi sentas *iom* da timo, tio signifas, ke vi sufiĉe zorgas

Ĉu nova nomo por Nov-Zelando?

David Ryan

Kiam maorioj alvenis ĉi-suben en proksimume la 14-a jarcento, ili donis la nomon *Aotearoa* (lando de la longa blanka nuboj) al la lando kiun ili "malkovris". Tamen, ili uzis tiun nomon nur por la norda insulo. Ne ekzistis oficiala maoria nomo por tio kio estas nun nia tuta lando ĉar ne ekzistis nacio, nur du ĉefaj insuloj kun multaj apartaj triboj en siaj propraj teritorioj. Ili interrilatis kaj interkomercis sed ankaŭ interbatalis.

Kiam nederlandanoj malkovris Nov-Zelandon en 1642, la unua nomo uzita en mapoj estis *Nieuw Zeeland* en la nederlanda pro nomo de nederlanda provinco (Zeeland). Dumtempe, Aŭstralio estis Nova Holando. Poste en la 18-a jarcento kiam britoj alvenis ĉi-suben, oni angligis la nederlandan nomon al *New Zealand* (Nov-Zelando). Fakte, estas surprizo por mi ke oni simple angligis nomon de nederlanda provinco. Kial ne elekti tute novan pli britan nomon, ekzemple King George Land aŭ New Cornwall aŭ New Yorkshire ktp, kiel Novsudkimrujo en Aŭstralio?

En la 19-a jarcento oni kreis nomon en la maoria lingvo por la tuta lando: Niu Tireni, Niu Tirini, Niutereni, aŭ Nu Tirani kiun oni uzas en la Traktato de Waitangi inter la Brita Reĝino kaj pli ol 500 maoriaj tribestroj en 1840. Tiel oni elparolas "New Zealand" maorie ĉar oni ne uzas **z** aŭ **l** aŭ **d** en la maoria lingvo.

Nun oni uzas "Aotearoa" kiel nian oficialan nomon en la maori lingvo kvankam tiun nomon maorioj uzis nur

por la norda insulo. Kelkaj politikistoj kaj aliaj homoj nun proponas ke oni adoptu "Aotearoa" kiel nian landan nomon anstataŭ "New Zealand" aŭ eble kune: "Aotearoa New Zealand".

Do, ĉu bona ideo? Jes kaj ne!

- Oni povas konsideri ke "Nov-Zelando" estas stulta nomo ĉar, preskaŭ 400 jarojn post mallonga vizito de nederlandanoj al nia lando, ni havas malfortan rilaton kun Nederlando. Fakte, nia rilato kun Aŭstralio estas milfoje pli forta. Kial ne "Nova Tasmanio" kiel nova nomo por nia lando? (Aŭ, kial ne "Okcidenta Nov-Zelando" por Aŭstralio?)

- En Nov-Zelando ni jam alkitimiĝis al la nomo Aotearoa. La nomo estas konata kaj multaj instancoj ofte uzas Aotearoa en sia nomo, sed plejparte nur en sia nomo kaj ne alimaniere ĉar malpli ol 4% de la loĝantaro parolas la maorian laŭ la popolnombrado de 2018. Pro tio, kelkaj homoj diras ke ne indas uzi la maorian nomon ĉar ĉiuj en Nov-Zelando parolas la anglan kaj nomo en alia lingvo ne necesas.

- Landoj rajtas adopti novan nomon. Pensu pri Zimbabvo (antaŭe Rodezio), Mjanmaro (antaŭe Birmo), kaj Burkino aŭ Burkina Faso (antaŭe Respubliko de Supra Volta). Tamen, nuntempe multaj landoj reklamas internacie: Turismu en Nov-Zelando! Aĉetu ŝafviandon de Nov-Zelando! Flugu per Air New Zealand! *Learn English in New Zealand!* Nia landnomo havas komercan

kaj kulturan valoron. Se ni adoptos novan nomon, ni devos rekomenci kaj elspezi multan monon por informi la mondon pri nia nova nomo. Male, nova landnomo povas doni al ni freŝan avantaĝon: Venu al Aotearoa (ĉu Aotearoo en Esperanto?), la plej nova lando de nia mondo!

- Okazis referendumo en 2016 por demandi ĉu nov-zelandanoj volas adopti novan flagon. Plejmultaj nov-zelandanoj decidis nee. Oni kritikis la tiaman registaran pro la alta kosto de la referendumo kiam tiutempe ekzistis pli urĝaj problemoj. Mi imagas ke la nuna registaro ne decidus adopti novan nomon sen referendumo. Ĉu indas alta kosto denove por referendumo kiam Nov-Zelando alfrontas multajn pli gravajn problemojn?

- Same, imagu la kostojn de nomŝanĝo por kompanioj kiel Air New Zealand kaj asocioj kiel la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Eĉ en Aŭstralio oni devos pagi. Ekzemple, ANZ devos esti AA, kaj ANZAC Day devos esti AAAC Day.
- En la angla mi estas "New Zealander". Se ni havos maorian nomon por nia lando, kiel diri Aotearoa-ano? Mi ne scias. Ne plaĉas al mi "Aotearoan" ĉar tiu estas gramatike malbela miksaĵo de maoria kaj angla lingvoj.

Do, mi invitas komentojn kaj reagojn de legantoj. Kion vi opinias?

Ni kongresis virtuale la unuan fojon

Katja Steele intervjuas Sandor Horvath (prezidanto de AEA)
kaj Jonathan Cooper (vicprezidanto de AEA)

Inter la 9-a kaj la 13-a de januaro 2021 okazis la 54-a kongreso de AEA. Ĝi estis la 7-a kongreso dulanda de la aŭstraliaj kaj novzelandaj esperantistoj (okazis jam ankaŭ du trilandaj kongresoj de AEA, NZEA kaj la Indonezia E-Asocio). La unuan fojon en la historio la kongreso okazis ne ĉeeste, sed virtuale. La pandemio devigis nin fari ŝanĝojn ne nur en niaj privataj kaj laboraj vivoj, sed ankaŭ en la maniero, kiel ni esperantumas.

Katja: Mi timis, ke ne multaj aŭstralianoj emos kunveni rete. Kelkaj el ni eble jam trosatiĝis de la perretaj eventoj, aliaj ankorau ne kutimiĝis al ili. Estis agrabla surprizo, ke tamen ĉeestis 200–250 homoj, el kiuj granda nombro estis eksterlandanoj. Kia estis la labordivido inter la “reĝisoroj” de la kongreso: vi kaj Jonathan Cooper?

Sandor: Mia tasko estis “ĉasi” la partoprenantojn, trovi prelegantojn kaj plani la program-horaron. En tio utilis mia sperto pri la organizado de dimanĉaj prelegoj (ses inter julio kaj decembro 2020), per kiuj mi ekkonis pli kaj pli da homoj — kaj iliajn retadresojn. Nun mi kontaktis ilin ĉiujn kaj proponis al ili prelegi aŭ simple partopreni en la kongreso. Al tiuj homoj aldoniĝis sufiĉe vasta aro de miaj propraj amikoj. Mi kalkulis je tio, ke la homoj ŝatas renkonti unu la alian.

Katja: Ĉu vi vidas avantaĝojn en la virtuala maniero de kongresumado?

Sandor: La organizantoj ne devas zorgi pri la loĝigo de la partoprenantoj, neniam plendoj pri la kvalito de la manĝoj, ne kostis havi prelegantojn eĉ el plej foraj landoj. Kaj ĝenerale estas malpli da laboro kaj malpli da elspezoj.

Katja: Kiajn elspezojn vi havis?

Sandor: Ni pagis la instruistojn kaj por la uzo de Zoom. NZEA kontribuis al la elspezoj kaj ni ricevis de la partoprenantoj donacojn. Laŭ la finkalkulo la tuta kongreso kostis al AEA \$300.

Katja: La membraro de AEA estas nur ĉirkaŭ 100 homoj. Mi iom timis, ĉu estos kontentiga nombro da partoprenantoj kaj demandis min, ĉu indas fari la laboron?

Sandor: Ni devas vivteni la movadon, eĉ se ni estas malmultnombraj. La kongresoj donas al ni la senton de kunligiteco kun la mondo. Kaj krome, oni havas bonan ŝancon lerni ne nur pri Esperanto, sed pri la plej diversaj temoj, kiel nun pri cikadoj, la kosma programo Artemiso, la Unua Mondmilito, ktp.

Katja: La kongresaj prelegoj estis vere diversstemaj. Kiujn vi ŝatis pleje?

Jonathan: Miaj plej ŝatataj eroj estis: kuirado kun Helen, interparolo kun Humphrey Tonkin, videoludoj, la prelego de Adonis Saliba pri efika diskonigado kaj instruado, cikadoj en la ĝardeno de Terry Manley, “montru kaj rakontu” (kiu ne postulis grandan preparon, tamen iĝis tre interesa).

Katja: Jonathan, via zorgo estis la teknika ebligo de aliro al la aranĝo kaj registro de la unuopaj prelegoj, vi starigis unu virtualan ĉambron el la tri kaj “kunreĝisoris” dum la prelegaj sesioj (forigis nedeziratajn bruojn). Apud ĉiuj tiuj taskoj vi mem prezentis eĉ tri prelegojn!

Jonathan: Mi ĝuas fari prelegojn, eĉ se mi havas antaŭ ĉiu publika parolado timon. En mia antaŭa profesio mi multfoje prelegis pri diversaj aspektoj de arto, tial mia nuna temo pri la koloroj. La duan

prelegon mi faris, ĉar mi ŝatas filozofion. La trian mi elektis, ĉar mi volis helpi tiujn, kiuj pretas esti prelegantoj, sed ne bone konas la teknikajn eblojn.

Katja: Kio estis por vi la plej granda defio?

Jonathan: Ĉeesti ĉiun sesion!

Katja: Ĉu vi ŝatis kongresi virtuale?

Jonathan: Tia kongreso estas malpli kosta, pli bona por la naturo kaj por la monujoj de la partoprenantoj ktp. Sed al mi mankis la fizika ĉeesto de la kolegoj. Estante en mia propra hejmo, kie mia edzino ne parolas Esperanton, ĉiu mia “eniro” kaj “eliro” el la programo funkciis kontraŭ la etoso de la kongreso, parte ĉar mi devis paroli angle. Kiam mi ĉeestis realan kongreson mi konatiĝis kun 40-50 homoj, kiujn mi renkontis dum la kongresa semajno plurfoje. Vidi iun virtuale ne helpas al interkonatiĝo. Krome dum nia kongreso pluraj aperis surekrane nur unu- aŭ dufoje.

Katja: Post la spertoj de la pasinta jaro oni nun parolas en Esperantio pri la venontaj

kongresoj hibridaj. Ĉu vi ŝatas la ideon?

Jonathan: Ni devus scii pli pri tiu eblo. Al mi ŝajnas, ke organizi hibridan kongreson estas duobla laboro por la organizantoj, ĉar oni devas prepari kvazaŭ du kongresojn samtempe. La ĵusa, nur virtuala kongreso, donis al ni sufiĉe bonan sperton.

Mi opinias, ke AEA ĝenerale kaj la du organizantoj Sandor kaj Jonathan, trapasis la “ekzamenon” pri la organizado de virtuala kongreso kun tre bona rezulto. Ni havis kvin buntajn tagojn de E-instruado (en tri niveloj), larĝan gamon de prelegoj, jarkunvenon, babilejon — ĉi-ĉion dum almenaŭ 10 horoj tage. Aplaudon kaj dankon al tiuj, kiuj havis la kuraĝon iri neniam antaŭe iritan vojon kaj ebligi al ni partopreni kongreson malgraŭ la pandemijaj limigoj.

Se iu deziras reviziti (aŭ sperti la unuan fojon) iun el la prelegoj, la registraĵoj estas troveblaj en la AEA-retejo (aea.esperanto.org.au).

Whanganui: vizitinda urbeto en Nov-Zelando

David Ryan

Whanganui (ankaŭ konata kiel Wanganui) estas urbeto kun loĝantaro de 45 000 en la okcidenta parto de la norda insulo je pli malpli 200 km norde de Wellington. Mi estas certa ke, post la nuna virusa krizo kiam vojaĝi eksterlande renormaliĝos, multaj aŭstralianoj volos viziti Nov-Zelandon.

Whanganui estas ĉarma urbeto kun multaj historiaj konstruaĵoj. Pro altaj kostoj en Wellington kaj Auckland, kelkaj homoj lastatempe translokiĝis al Whanganui ĉar tie oni trovas ĉion: butikojn, bankojn, hospitalon, preĝejojn, lernejojn, flughavenon ktp. Tamen, oni ne trovas altajn domprezojn!

Whanganui estis sufiĉe grava urbeto por farmbienistoj en la ĉirkaŭa regiono en la 19-a jarcento ĉar ĝi troviĝas sur marbordo je riverdelto. Tamen, nun turismo pli gravas kaj turistoj vizitas la urbeton kaj riveron por ferii. Ekzemple, eblas ekskursi

laŭ la Whanganui-rivero en historia padelŝipo.

En decembro 2020 ni ekskursis aŭtomobile laŭ la rivero kaj mi ege rekomendas ke vizitantoj al Nov-Zelando faru tiun tag-ekskurson. La pejzaĝo estas ege bela kaj la vojo estas tre trankvila sen multaj aŭtomobiloj. Fakte, mi kredas ke estas pli populara bicikli laŭ la rivera vojo aŭ kajaki en la akvo.

Oni vidas multajn ŝafojn, maoriajn domojn (*whare* en la maoria lingvo), kaj tre vizitinda loko estas Jerusalemo kun preĝejo konstruita en 1892–93. Tie oni starigis katolikan mision kaj konventon en la 19-a jarcento kiam loĝis tie centoj da maorioj. Nun monaĥinoj loĝas ankoraŭ en la konvento, kaj vizitantoj rajtas mendi dormĉambron por ĝui la trankvilecon. Ne funkcias poŝtelefonoj kaj ne estas butikoj.





Australian Esperanto Association
Financial Report
January to December 2020

The accounts have been prepared using the MYOB computer accounting system.

We suffered a loss this year of \$10 896 owing to congress income showing on the 2019 balance sheet, (the yearly profit being \$24 556) but most expenses showing on the 2020 balance sheet.

Income on our Fondusoj and Term-Deposits remained low at \$4126.10 owing to the low interest rates still operating and the only change I see is that the interest will decrease even more in 2021. Our membership fees are slightly down on 2019 with a decrease to 97 members but some new members have signed up already this year which is encouraging.

Life memberships that have been received this year are from Alan Turvey, a new member Michael Schooneveldt and Fran-ciska Toubale.

I think we may have to look at increasing our membership fees as the price of print-ing and sending ESK has risen, especially for overseas members.

Our assets are still over \$215 000 which ensures our financial viability for some time to come.

Heather Heldzingen
Kasisto

Aŭŝtralia Esperanto-Asocio
Financa Raporto
Januaro ĝis Decembro 2020

La kontoj estis preparitaj per la komputila sistemo MYOB.

Nin trafis perdo ĉi-jare de \$10 896 tial ke la kongresa enspezo inkluziviĝis sur la bilanco de 2019 (kie la jara profito estis \$24 556) kvankam la plimulto de la elspezoj aperis sur la bilanco de 2020.

La enspezoj el niaj Fondusoj kaj Por-periodaj Mondeponoj restis malaltaj, entute \$4126.10, pro la ankoraŭ malaltaj interezoj, kaj la sola ŝanĝiĝo anticipebla estas ke la interezo malkreskos ankoraŭ pli en 2021. La en-spezo el niaj membrokotizoj estas iomete malplia kompare al 2019, pro malkresko al 97 membroj, sed kelke da novaj membroj jam enskribis sin ĉi-jare, kaj tio estas iom re-trankviliga.

Vivmembrecoj ricevataj ĉi-jare estas de Alan Turvey, de nova membro Michael Schooneveldt, kaj de Franciska Toubale.

Miaopinie ni konsideru levi niajn membrokotizojn, ĉar kreskas la kosto presi kaj dissendi ESK, aparte poŝto al alilandaj membroj.

Nia aktivo restas super \$215 000, kio certigas nian financon stabilecon en la videbla estonteco.

Heather Heldzingen
Kasisto

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Ivan Pivac | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Treasurer/Secretary**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Bradley McDonald

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1150
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
0800 350 781

